

N°189
janvier
février
mars
2019

LA INFORMILO

N° 189
januaro
februaro
marto
2019

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

ESPERANTO

2020

Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges"

27, rue de la République
FR-54000 NANCY

=====

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



Katerina kun siaj lernantoj
el Novosibirsk



Mikaelo Bronŝtejn

Une centaines d'espérantophones aux Issambres.

Ils sont venus des quatre coins de l'Europe et même du fin fond de la Sibérie, de Novosibirsk! Une centaines d'espérantophones se sont retrouvés en ce début mars 2020 aux Issambres, pour découvrir les rives de la Méditerranée, parcourir l'arrière-pays et participer à un riche programme culturel (conférences, débats, chants et danses). L'écrivain russe Mikaelo Bronŝtejn a présenté ses ouvrages et a interprété ses poèmes en espéranto, accompagné de sa guitare.

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

La 5-a LUMINESK' en Nördlingen
28.12.2019 - 3.1.2020

La urbo Nördlingen estas jam konata de samideanoj pro jam 3-foja okazigo de iamaj Internaciaj Festivaloj.

Jen en la sama JUFA-hotelo okazis la 5a Luminesk', kiun nun regule organizas GEA, la Germana Esperanto-Asocio.

Andreas Diemel estas la ĉefa organizanto, helpata de Barbara kaj Ulrich Brandenburg kaj aliaj kunhelpantoj.

Kio speciala en la urbo Nördlingen?

Antaŭ 15 milionoj da jaroj falis giganta meteorito kun diametro de mil metroj ĝuste tie, kie nuntempe troviĝas Nördlingen. Ĝi kaŭzis apokalispan katastrofon kaj eksplode formis krateron de 30-kilometra diametro. Tio estingis ĉian vivo pro temperaturo ĝis 20.000 gradoj. En tiu infera varmego la materio de la meteorito miksiĝis kun la tera surfaco kaj estigis la "sueviton" (ŝvabaj ŝtonoj), el kiuj estas konstruitaj multaj domoj en Nördlingen, inkluzive la preĝeja turo "Daniel".

Krome la urbo estas komplete ĉirkaŭata de muro kaj alirebla tra 4 pordoj. Nuntempe ĝis estas interesa promenoĵo. En la 15a jarcento malamika duko deziris konkeri la urbon per subaĉeto de gardisto, sed dank'al porko, ĝuste tie ĉe la pordo, la urbo estis savita kaj la gardisto severe punita.



En la alveno-tago, la 28an de decembro post la vespermanĝo ekestis tradicio, krei frand-vesperon, en kiu partoprenantoj proponas iujn specialaĵojn de sia hejmlando aŭ hejmurbo. Tiel eblis gustumi diversajn alkoholaĵojn, kuketojn, dolĉaĵojn.

Ĝi samokaze estas la bonveniga vespero. Pluraj kontribuantoj prezentis sian prelegon aŭ intervenon. La

o r g a n i z a n t o j iniciatis, ke ĉi-foje la ĉiu-taga programo estu elŝutebla kaj legebla en propra

poŝtelefono, nur ĉe la muroj aperis la programo kun la planitaj ŝanĝoj. Eble ne ĉiuj ŝatis tiun manieron.

Jam en la posta tago eblis ĝui la gvidadon de Thomas Bormann tra la historia urbo kun interesaj klarigoj pri la vivo kaj la metioj en la mez-epoko.

La daŭre ekzistanta urba muro ĉiam protektis la urbon Nördlingen; neniam en la historio okazis batalo en la urbo. Ni promenis tra la kvartalo de la tanistoj, kiuj dum jarcentoj kontribuis al la riĉeco de Nördlingen. Nuntempe dekoj da iamaj tanistaj domoj estas bele rekonstruitaj. Iuj kuraĝe grimpis la 143 ŝtupojn de la preĝejo Sankta Georgo kun sia turo "Daniel"



Inter la unuaj prelegoj troviĝis tiu de Ulrich Brandenburg kun la temo:

La konflikto en orienta Ukrainio:

La 9-an de decembro en Parizo renkontiĝis la prezidantoj de Ukrainio, Rusio kaj Francio kaj la kancelierino de Germanio por pritrakti la konflikton en la Donbas-regiono de orienta Ukrainio. Estis la unua kunveno je tiu nivelo en la "Normandia Formato" depost 2016. La konflikto komenciĝis en 2014. Mortis en ĝi ĝis nun ĉirkaŭ 13.000 homoj. Pli ol du milionoj fuĝis el la regiono. En la ruse kontrolata parto de la provincoj Doneck kaj Lugansk fondiĝis internacie ne agnoskitaj "popolaj respublikoj".

Ekde 2015 kiel rezulto de unu el la "Normandiaj" renkontiĝoj laboras la t.n. Triflanka Kontaktgrupo. Ĝi kunvenas ĉiun duan merkredon en la belorusia ĉefurbo Minsk ĉefe por solvi praktikajn problemojn ligitajn al la konflikto en tiu dividita regiono.

Liaj lumbildoj montris, kiel emeritoj bezonis piede transiri la limon por ricevi sian modestan pension. Ĉar ne funkcias "interregionaj" strukturoj por tiaj interŝanĝoj. Li menciis la obstaklojn, kiuj ĝis nun malhelpas la solvon de la konflikto.



Emerita ambasadoro. U. Brandenburg montris lumbildojn pri la konflikta regiono de Donbas en orienta Ukrainio. Post sia emeritiĝo li plu laboras por la solvo de praktikaj problemoj kadre de triflanka kontaktgrupo.

Barbara Brandendurg refoje iniciatis la konkurson:

Majstrokuiristo.

Ĝi konsistas en du partoj:

- la unua estas kvizo, en kiu ĉiuj povas partopreni por respondi al demandoj pri nutraĵo, kuirado kaj specialaĵoj. La 3 plej bonaj kunludantoj povos partopreni la kuiradan konkurson.
- la dua parto konsistas el la kuirado mem. La tasko estas sekreta, sed povas esti plenumita en deko da minutoj.

Tamen ĉi-foje la kvizo-gajnintoj ne deziris esti en la kuirado-konkurso, tial okazis iom diskretaj personaj



interŝanĝoj. Tamen pri tio ni eksciis nur en la lasta tago.

Jen diligente laboras la 3 "gekuiristoj"

La ĵurio longe devis prijuĝi la plej bonan preparaĵon, laŭ la prezentado, laŭ la gusto.

Ĝin ricevis Patricia Gobert el Belgio. (la malsupra telero).



Pri la cetera programo rakontas Dieter Rooke:

Profesoro pri astronomio. A. Wandel prelegis en la IVU = Internacia vintra universitato

Pri temo: Kie kaj kiel ni verŝajne malkovros la unuan eksterteran vivon? La aŭskultintoj post lia prelego trapasis ekzameneton, ricevonte atestilon.

Nia sun-sistemo

- Terecaj planedoj: Merkuro, Venuso, Tero, Marso
- Gasaj gigantoj: Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno

Nun oni ne plu demandas, ĉu vivo ekstertera ekzistas. Sed kiam, kie kaj kiel ni ĝin

La Kopernika principo kaj ekster-tera vivo

- Tero ne estas speciala:
- ĝi ne estas la centro de la universo
- nek la sola planedo kun vivo
- Ĉu por evoluo de vivo estas necesa planedo simila al Tero?

Lia dua prelego temis pri la sekreta jida lingvo en bavara vilaĝo. Schopfloch. La lingvo nomiĝas: la choudish

Kvankam de jaro 1940 ne plu loĝas judoj en la vilaĝo, tamen maljunaj enloĝantoj ankoraŭ parolas tian dialekton, kaj eĉ verkis vortareton.

Pri tikla temo de neŭtraleco de Esperanto parolis D. Rooke, membro de SAT= Sennacieca asocio Tutmonda. EC= Esperanto Civito. Ateo = ateistoj. Lia dua prelego temis. pri renkontiĝo. kun famaj Esperantistoj, kiujn li intervjuis kiel redaktoro. de Esperanto-gazeto Heroldo.

La demando, ĉu ekzistas vivo ekster-tera estas multjara, sed en la lastaj dek jaroj aperis novaj esploroj, kiuj proksimigas nin al la respondo. Astronomoj kaj astrobiologoj havigis sciencajn respondojn kaj faktojn, kiuj ĝis antaŭ dudek jaroj ŝajnis ne atingeblaj. Ekzemple, oni trovis ke multaj steloj (foraj sunoj) havas planedajn sistemojn kiel nia sunsistemo, inkluzive de planedoj similaj al Tero, kun kondiĉoj taŭgaj por evoluo de vivo. En foraj sunsistemoj la spac-teleskopo Kepler trovis milojn da planedoj, pluraj el ili similaj al Tero kaj taŭgaj por vivo.

La du redaktoroj de la Revuo Esperanto, Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, faris serion de prezentoj. Ambaŭ opinias, ke unu el la plej gravaj aferoj estas la dialogo konstanta inter legantoj kaj redakcio.

Ĉiutage alvenadas tre multaj mesaĝoj kun proponoj, reagoj, gratuloj, demandoj, komentoj. La kvanto kreskegas pro la tradicia komunikemo kaj ankaŭ pro la ĉiutagaj publikaĵoj en la reta revuo. Moderna teknologio proksimigas la legantojn al la redakcio.

Dima Ŝevĉenko rakontis pri la libro-eldonagado en Moskvo. Ĝi komenciĝis per Aleksandro Saĥarov en jaro 1908, ankaŭ en Moskvo.

La nuntempa plej furora libro kun titolo: "Mi stelojn jungis al revado" estas verkita de M. Bronŝtejn, Aktiva partopreninto de multaj IF-oj kaj en Luminesk. La romano temas pri la E-movado en iama sovetunio.

Anna Striganova mergiĝis en sia favorata regno de fabeloj. Ŝi ŝpinis fadenojn de ŝi al li kvankam la rakontisto evidente estas ĉiam mi.

Denove okazis la amuza konkurso de majstro- kuiristo, sub gvido de S-ino Barbara Brandenburg.

Ĉijare venkis post granda klopodado, S-ino P. Gobert el Belgio. (neniu gustimis ŝian pladon- krom la ĵurio)

S-ino Gobert kompanse diskonigis sian utilan projekton: manĝebla arbaro. La arbaro konsistus el frukt-arboj, miksita kun ĝardenaj legomoj. Jam ekzistas tereno en loko Lobben de Valonio, Belgio.

En la 30a de decembro okaze de duontaga ekskurso, eblis viziti la bavan trajn-muzeon, kiu troviĝis en Nördlingen mem kaj estis piede atingebla. Yves Nevelsteen interpretis la klarigojn de la tipe vestita gvidanto.



Troviĝis tie multaj vapor-lokomotivoj, kiujn teamoj de malnovaj fervojistoj klopodas restaŭri. Pri ili ni ricevis multajn detalajn teknikajn informojn. Tamen plej interese estis ekscii pri la 4 malsamaj trako-sistemoj kaj horo-sistemoj en la 19a jarcento en la regionoj ĉirkaŭ la konstanca lago. Tio postulis ĉe la limoj de regionoj ŝanĝi la vagonojn....

Tia estis la tiama vivo.

Ĉe la fino de la vizito la grupo estis akceptita en tipa restoracio-vagono por frandi kafojn kaj kukojn.



S-ro Ives (Yves) Nevelsteen kompilis liston de novaj fakterminoj pri komputila tekniko.

Krome li prizorgis libroservon de flandra Esperanto-ligo kun Esperanto-poŝkalendaro. Li estas iniciatinto de "Eventa servo" trovebla en interreto.

Pri vojaĝo tra Tanzanio en orienta Afriko kaj tiea Esperanto-movado prezentis ravajn lumbildojn Dieter Kleemann.

Kun edzino li ĉiuvespere brile prizorgis la noktan "Gufujon" kun oferto de sen-alkoholaj trinkaĵoj, frandaj dolĉaĵoj kaj distra programo: lu rakontis fabelojn, skeĉon, humuraĵon. S-ino Lipari, eksa UEA-estrarano organizis kvizon pri Esperanto-kulturo. La gajninta teamo ricevis "senpage" aliĝilon por la itala kongreso en Asizi!

Rezistema al malvarmo, S-ino Tytgat kuraĝas naĝi en glacia akvo. Ŝi asertas, ke malvarma akvo forlavas la ĉiutagajn problemetojn, kaj donas novajn fortojn.- Se vi ne kredas, do, vi bv. konvinkiĝi.

Ĉiamulo S-ro Rob Ketlaar rakontis pri privataj E-projektoj, kaj ĝiaj defioj. Li mem iniciatis marŝadon de Esperantistoj dum 4-taga marŝo en regiono de



Nimego, Nederlando. En jaro 2019 jam partoprenis sep Esperantistoj, i.a. K. Kovács estrino de edukado.net.

La silvestran balon enkondukis la tradicia polonezo, post abunda bufedo. Bonvenon al nova jaro 2020 kun multaj tostoj, kisetoj kaj brakumoj.

La unuan tagon de la jaro ni grimpis la komplete konserviĝintan urbo-muron. La rondon ni promenis admirante la panoramon de mezepok-stila konstruaĵaro.

Dum la Internacia Vespere ni kantis entuziasme la himnon "La espero". La diversajn maldecajn parodiajn versiojn ankoraŭ rememoras la iama TEJO-estrarano Mikaela Lipari.



La ĥoro Internacia el Luminesk aŭdigis la romantikan kanton. "la birdeca birdo" en originala eŭska lingvo, kaj poste en traduko de Renato Corsetti.



La tuttaga ekskurso okazis la 2an de januaro. La tuta grupo atingis la urbon Aalen per regiona trajno. Tie sur la placo ni eksciis pri Schubart, (ne Schubert) poeto, orgenisto, germana komponisto. Lia poemo "La Truto" estis uzata fare de Franz Schubert por komponi la sam-noman muzikaĵon "La truto".





Poste ni piede atingis la romian muzeon "Limes-muzeo". Tie eblis klare vidi la limon de la romia imperio de la cetero de tiama Germanio de la jaroj 160 ĝis 260.

Surloke multaj restaĵoj atestas pri la vivo de la romiaj soldatoj.

Krome pluraj fajnaj sciencaj analizoj ebligis koni la klimaton de tiu epoko kaj la vivmanierojn.

Post tiu vizito la tuta grupo manĝis en greka restoracio.

La urbo Aalen posedas bibliotekon kun granda Esperanto-fako.

Tial ni revenis al la centro, survoje ricevis klarigojn pri enurbaj monumentoj.



KRIMLUDO 2019– LUMINESK

TITOLO: TRESOR-RABO en DRESDENO-Dua Eldono

Laŭ tiu titolo Dieter kaj Yoshie proponis solvi tiun enigmon. 7 personoj ludis sian rolon antaŭ la publiko, kiu helpe de la komisaro provis trovi, kiu estas la suspekta persono. Ŝajne plej suspektita estis la gardisto en la rezidea kastelo de Dresdeno.

Jen en la lasta vespero Gijom Armide koncertis por la tuta Lumineks kiel nud-pieda kantisto.

Liaj kantoj estis kelkfoje provokaj kvazaŭ kolero al la mondo.

Sed lia lasta kanto estis iom pli emocia.

Li ricevis varmajn aplaŭdojn.



Raportas Andreo kaj Dieter, fotoj de Andreo

Preskaŭ ĉiu-vespere la gufujoj allogis homojn por babili, kune trinki teojn, kiujn proponis Yoshi. Dume eblis aŭskulti fabelojn, rakontojn kaj en la lasta vespero la anekdotojn de Andreo. Jen eta skeĉo inter bankisto kaj kamparano.



Dum la adiaŭa vespero estis okazo por danki la organizantojn, kiuj strebis por plej taŭge akcepti la partoprenantojn dum tiu 5a Luminesk.

Amri Wandel transdonis la premiojn al la IVU-partoprenantoj.

Jam estas anoncita, ke la venonta Luminesk okazos en Bielefeld.

Ĝis venonta jaro.





Kie troviĝas **Kamĉatka**? Jen Katerina rakontas al ni pri tiu RA (Renkontiĝoj de Amikoj), kiu vojaĝis ĝis la plej ekstrema parto de Rusio. Ni akompanu ŝin ĝis tiu fora duon-insulo.

RA-tradicia renkontiĝo, organizita de Novosibirska E-klubo. La unua aranĝo okazis en 2001. Plej ofte ĝi venigas inter 30- 60 homoj. La plena nomo de RA estas Renkontiĝo de Amikoj kaj ĝi estas nekredeble vojaĝema aranĝo, ĉar ĝi estas turisma. Ĝi jam okazis 14 fojojn en diversaj regionoj de Rusio: Ĥakasio, Altajo, Krimeo, ĉe la lago Bajkal kaj pasint-jare en Kamĉatka. Kamĉatka estas duoninsulo en fora oriento de Rusio, tre apudas al Japanio kaj Koreio. Regiono de sovaĝa naturo, vulkanoj, varmaj fontoj kaj ursoj!



Ni estis dektri ĉi-jare, ĉar la vojaĝo ne estis malmultekosta kaj oni devis kelk-foje noktumi en tendoj. Venis nur bravuloj! 10 rusoj kaj tri koreoj. Sed la loko vere estas tre vizitinda! Ni grimpis

2 vulkanojn, havis mar-ekskurson dum kiu ni gustumis marajn erinacojn kaj banis nin en multaj varmaj fontoj. Naturo mirigis nin plene! Ni pied-marŝis, ĉeval-rajdis kaj ĝuis vidi spurojn de ursoj (feliĉe ne ursojn mem!) Floroj kaj neĝo, vento kaj suno. Ĉio ĝojigis nin kaj la grupo bone unuiĝis dum nia vojaĝo. Iam ni nepre ripetos la saman itineron, ĉar ĝi estis vere neforgesebla!



Fotoj kaj teksto de Katerina



Informoj pri TAKE Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

Ni havas la plezuron informi vin, ke la fak-asocio TAKE ĵus sukcesis aperigi sian jaran revuon **"KONSTRUADO-kajero de TAKE 2020"**.

Ĉi-apude troviĝas la titoloj de la diversaj artikoloj de la ĉi-jara numero. El Ĉinio la asocio ricevis libron en la ĉina kaj en Esperanto kun la titolo "Ŝtonaj fenestroj". Tio instigis la redaktoron elekti kiel ĉefan temon "Fenestroj" por 2020.

Tuta artikolo rilatas al "Antikvaj fenestroj en Ĉinio". En tiu regiono de Ĉinio, pro pratempaj mitoj kaj legendoj, saĝaj ŝtonistoj en montaro ĉizis ŝtonojn kaj faris el ili artverkojn kun diversaj simbolaj signifoj.

La artikoloj pri "Nia Damo de Parizo" kaj pri ĉarpentaĵoj plene aktualas, pro la daŭra restaŭrado de la katedralo en Parizo.

La artikolo pri "Zaleski-Zamenhof" montras, ke li estis ne nur la nepo de Zamenhof sed ankaŭ fakulo pri prem-betono.

ENHAVO

Titolo

- 1 Enkonduko
- 2 Antikvaj fenestroj en Ĉinio
- 3 Fenestroj
- 4 Bano kaj duŝo
- 5 Nia Damo de Parizo
- 6 Post la incendio kio okazis?
- 7 Nacia Muzeo de Rio
- 8 Harmonio & Proporcioj en Arkitekturo
- 9 Ĉu poluado per plumb?o
- 10 Betona ĉarpentaĵo en Reims
- 11 Ŝtala ĉarpentaĵo en Vieno
- 12 Betona ĉarpentaĵo en Noyon
- 13 Kovri tegmenton per plumb?o
- 14 Mantiloj sur vendejgo
- 15 Zaleski-Zamenhof
- 16 Utilaj informoj




Ĉiuj membroj de TAKE ricevas la ĉi-jaran eldonaĵon **"KONSTRUADO-kajero de TAKE 2020"**, Laŭ la ĉi-subaj tarifoj eblas membriĝi al la fak-asocio TAKE kaj ricevi la ĉi-jaran broŝuron.

Ankaŭ eblas mendi antaŭajn numerojn de **"KONSTRUADO-kajero"** kaj de **"Jarkolektoj"**.

Nia redaktoro Pierre Grollemund volonte povas akcepti viajn proponojn aŭ eĉ viajn kontribuiaĵojn por venontaj numeroj. Bonvolu tiam rilati kun li : verdapigo@gmail.com

La komitato de TAKE

KOTIZOJ AL TAKE	2020	2021	2022
Normala kotizo	8 eŭroj	8 eŭroj	8 eŭroj
Subtena kotizo	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Ĉiuj membroj ricevos en 2020	La KONSTRUADO-kajeron TAKE (ampleksa teknika kajero)		
Eblas mendi antaŭajn numerojn por la jenaj jaroj: Mendo de 1 ekzemplero: 8 eŭroj	Konstruado-kajeroj 2020 2019 2018 2017 2016 Jarkolektoj: 2015 2012 2011 2010 2009 2008 2007 2006		
Pago en Francio	Per ĝiro al TAKE: Poŝt-banko: CCP 2 549 46 A Strasbourg Per sendo de franca ĉeko en eŭroj je la nomo de TAKE-Esperanto, al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM Francio		
Pago Internacie	Internacia ĝiro al TAKE: IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC: PSSTFRPPSTR		

Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>	S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY	03.83.47.41.36 06 76 54 77 78	liliber54@yahoo.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ro Robert KUENY	09.71.31.37.62	kueny.robert@orange.fr
<i>Assesseurs</i>	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Gilbert STAMMBACH	06 87 40 01 16	gilbert.stammach@gmail.com
S-ro Hervé KIEFFER	06.21.09.19.98	kiefferherve@gmail.com	

Abono al La Informilo →	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Semajno en Les Issambres	15. Libro-servo	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i></p>
2. Luminesk en Nördligen	16. Trixini rememoroj	
3. Luminesk en Nördligen	17. Trixini rememoroj + Grésillon	
4. Luminesk en Nördligen	18. Enigmoj + anekdotoj	
5. Luminesk en Nördligen	19. Abonoj kaj kotizoj	
6. Luminesk en Nördligen	20. ACM en Benino	
7. Migrado en Kamĉatka	21. 18a Nov-jara renkontiĝo	
8. Konstruado-kajero de TAKE	22. 18a Nov-jara renkontiĝo	
9. Komitatanoj kaj enhavo	23. 18a Nov-jara renkontiĝo	
10. Angulo de la prezidanto	24. 14a Mediteranea Esp-Semajno	
11. Avula angulo (sekvo)	25. 14a Mediteranea Esp-Semajno	
12. Mia hundo - Saĝa hundo	26. 14a Mediteranea Esp-Semajno	
13. Kongresoj Hispanio Germanio	27. MES Niaj prelegantoj	
14. Esperanto-blogoj	28. Nia foto-paĝo	



Karaj gesamideanoj,

Jam ni antaŭĝojis pro la ebleco kunveni en Art-sur-Meurthe, apud Nancy, por ĝui la prelegojn kaj libroprezentojn de Petro Chdle kaj koncerton de la itala kantistino Kjara. Pro tiu aĉa viruso, kiu disvastiĝas tra la tuta planedo kaj kiu – laŭ la statistiko – plej danĝeras por la – ni diru – malplej junaj personoj, ni decidis nuligi la renkonton.

Ĉio tio tamen permesu al ni revii: se nia lingvo same rapide disflugus tra la mondo ... Revoj ja - ĝis nun – almenaŭ ebligis al ni pluesperi pri iama venko!!!

E.L.

Aŭskulteblaj voĉoj en Esperanto per tiuj podkasto

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova epizodo de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

- KP175 Kristiano - La libera urbo ene de Kopenhago, ĉefurbo de Danio
- KP176 Kvinjariĝo - Tempo por resumi kaj rigardi antaŭen

Neregule aperas la epizodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

- MvP023 UEA estraro - Interparolo kun du membroj de la novelektita estraro de UEA

Pliajn epizodojn vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>
Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje>
Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

Informas Julia

Ni perdis amikon.

Kun granda konsterniĝo ni eksciis pri la morto de Peter Focke, kiu kune kun sia edzino Nicole Bérout-Focke agadis centre de la Esperantogrupo de Bazelo.

La entombigo okazis vendrede, la 28an de februaro

Ĉiuj kiuj konis lin, volonte memoros pri li.

Ni perdis amikon.

Ursula Niesert

Se ĉio estus normala, mi ĉi-loke invitus vin partopreni la staĝon en Art-sur-Meurthe ĉe Nancy - Esperanto France-Est ĉiujare okazigas ĝin kun BAVELO.

SED ... bedaŭrinde ankaŭ ĉi tie la kronviruso kaŝe enmiksiĝis kaj devigis nin nuligi la aranĝon. Domaĝe, ĉar certe ĝi fariĝus tre interesa staĝo.

Amike, Ursula Niesert

AVULA ANGULO

Armand HUBERT ... *alflugas rememoraĵoj*



Ĉu cunamo aŭ ne?

Septembro 1944.

Alproksimiĝas la milit-fino. Por ni.

La Aliancanoj surteriĝis en Normandio. Ĉi-monate ili jam estas ĉe la rivero Moselle; jam en Dieuze, la najbara urbeto. En la direkto de subiranta suno tondras kaj tondras kanonoj. Super-flugas la vilaĝon usonaj ĉas-bomb-aviadiloj "thunderbolt". Ĉiutage. La germanaj kolonianoj senlaŭte foriris. Lorenanoj



Ĉas-bomb-aviadilo:
Usona "thunderbolt"

pridemandis sin: Kiel okazos la nekredblaĵo? Nehaltigebla tajdo de fero kaj mortigo antaŭen-progresas rekte al ni. Fotoj de ruinigita urbo Caen (Francio) terurigas: la batalo okazos sen indulgo. Timo ekregas en la loĝantaro. Sed la ŝanĝo fariĝos, ĝi devas esti farota. Ni atendas ĝin. Luj pafiluloj forfuĝos, aliaj anstataŭos ilin.

Ĉu bomba cunamo aŭ ne?

Iun mardon en septembro, la unuaj obusoj eksplodis proksime de voj-kruĉiĝo, ĉe la eliro de la vilaĝo. Okcidente oni aŭdas elpaŝon, surdan, kaj tuj, super la kapoj, fajfas la obuso, kaj tuj oni lokigas ĝian mortigan terbaton. Kien kuri? Kie serĉi rifuĝon? Niaj keloj ne estas taŭgaj. Nur la keloj de la "kastelo" kaj de la paroĥo-domo estas volbitaj; ili rezisteblos kontraŭ bombado.

La obuso-salvoj ĉesis ĉirkaŭ tagmezo.

Nia familio elektis la kelon de la paroĥa domo kiel rifuĝejon. La viroj kuras tien kaj aranĝas la lokon por akcepti familiojn dum-nokte. La virinoj pretigas korbojn: bezonatas iom da manĝaĵo, lit-kovriloj. Ĉu mantelo? Afliktas ĉiujn la tuja danĝero. Dume la oreloj streĉiĝas okcidenten pro la demando: Ĉu pli longe daŭros la sekuriga paŭzo?

Je la noktiĝo, la rifuĝeja kelo pleniĝis. Febla lampo lumigis la iradon de homoj; kelkajn kandelojn oni kaptis en la preĝejo. La infanoj trovis sian lokon sur asignita lito. Regis ia sereneco. Ĉar ĉiuj klopodante serĉis trankviligon de ĉi-tiu ekstravaganca situacio.

Sed jen aperis SS-kapitano (*). Tuja, timiga silento altrudiĝis. Estis viro nigre vestita, kaskedita, botita. Li klakis la kalkanojn, lanĉis nazian saluton. Perforte li artikis: "Der Feind steht vor der Tür. . . ." "La malamiko staras ĉe nia pordo. Niaj soldatoj retiriĝis sur nova defenda kaj decida linio. Ankaŭ vi devas retiriĝi. Sekurece dum tiu nokto."

Sufokiga silento sekvis.

(*) = SS: Schutz Staffel: cinika, plenumista polico.

Tiam la pastro paŝis antaŭen, stariĝis antaŭ la strikta uniformulo. Kaj trankvile li diris: "Ĉi-tie estas homoj, kiuj jam fuĝis el proksima urbeto. Kien do ree fuĝi? Ni timas malpli en ĉi-tiu vilaĝo." La SS: "Estas ordono de la Komandantejo." La pastro: "La loĝantaro estas kuraĝa. Decidis ĝi resti kaj alfronti la eventojn. Laŭ Dia volo!"

La du viroj fiksrigardis sin, vizaĝon al vizaĝo. Tiam kalkana klakado, nazia saluto kaj returniĝo. La SS resupreniris la ŝtuparon. Ĉiuj okuloj sekvis la botojn, kiujn la kela volbo iom post iom kaŝis.

Streĉiĝo persistis dum longa tempo. Sed la nokto trankviligis la mensojn.

UF! JEN LA ŜANĜIĜO!

Je tagiĝo, kiam ni forlasis la protektan kelon, stranga silento regis en la stratoj. Ĉio estis trankvila en tiu nenies-lando, inter la nazia obsed-etoso, vaporiginta, kaj la atenditaj "usonanoj".

"La usonanoj?" Ili estas tie, okcidente, preter lago kaj arbaro: ili sendis al ni kelkajn obusojn el tiu orientiĝo. Nun ne plu estas kanonado; neniu aviadilo en la ĉielo. Laŭ kiu vojo ili montros sin? Ni streĉe atendas: Eble morgaŭ!

Kaj posttagmeze, jen klakado de milit-ĉaro: ni akriĝas la orelojn. "Ĉu vi aŭdis tiun ĉen-bruon?" Iru kaj vidu! Knaboj kunvenas sur la placo. Jen, ĉe la rando de la arbaro, trans la valo, tanko. Malpli ol unu kilometron for. Nenio komuna kun *tigro-* aŭ *pantero-tanko*, konataj germanaj mortig-mekanikoj. Ne! Aliancan *ŝerman-tanko*! Ĝi ne moviĝas; ĝia kanono celas la vilaĝon. Oni observas nin de tie; ni observas ĝin niaflanke. Tiam subite ni komencas moviĝi, ridi, kuri, salti. "Ili estas ĉi-tie!" Ĉiu kuras en sian familion raporti tion, kion li vidis.



ĵipo: usona "jeep", kutima, konkerema veturilo sur ĉiuj batalejoj de la Dua Mondmilito.

La sekvantan tagon nur, "ili" ekposedis la vilaĝon. Alvenis: Ĵipoj, mitral-veturilo, kamionoj kaj multaj GI saltantaj de veturiloj, fusiloj antaŭen, direktante sin al la domoj. La vilaĝanoj eliris el la domoj; ridetis ili, timeme salutis. Oni laŭte aŭdis la anglan surstrate: la ŝanĝo aktualiĝis! Kapitano alproksimiĝis de nia domo. Li parolis la germanan. Mia patrino havis ĉambron proponindan al li. Li ekloĝis tie kaj akceptis min kiel ligan kun la familio. Honorigo por la dek-kvin jaraĝulo.

Mia patrino pretigis rostitan kokidon por la alvenintoj.

Armand Hubert

Mia hundo estas grava persono!

Jam de iom da tempo mia hundo strange kondukas, kvazaŭ ĝi estus homo. Tio maltrankviligas min kaj mi ne sukcesas malkonvinki ĝin. Ne pro la fakto, ke mi taksas ĝin pli stulta ol reale. Sed ĉar ĝi ŝajne taksas sin kvazaŭ grava persono. Male, ĉu mi imagas min esti hundo? Ĉu?

Laste okazis ia strangaĵo. Mi promenadis kun mia hundo, tenante ĝin ĉe la kondukŝnuno. Tiam mi renkontis sinjorinon kaj ŝian filineton kaj mi aŭdis, ke la sinjorino petis sian filineton. "Iru por karesi la hundon!" Tiam venis la knabineto kaj mian manon karesis. Mi provis signi, ke ŝi eraris, sed vane, ŝi daŭre milde karesis mian manon. La sinjorino aldone diris: "Vi ja konstatas, ke ĝi ne estas mordema!" Mia hundo ja ne deziris maltrafi tian oportunaĵon kaj aŭdace diris: "Sinjorino, al ĝi bedaŭrinde mankas nur la parol-kapablo!".

Kiam unua-foje mi aŭdis mian hundon paroli, mi estis ege surprizita! En iu vespero, post la vespermanĝo, mi estis kuŝanta sur la tapiŝo kaj dormetis. Mia hundo sidis en mia fotelo kaj rigardis televidon. Subite ĝi diris al mi: "Ĉu ne eblas de tempo al tempo spekti alian kanalon!" Tuj mi ne komprenis la aludon kaj diris al ĝi: "Ne parolu al mi laŭ tia tono!" Ĝi tiam respondis: "Efektive ĝis nun mi ne reagis, sed mi tamen opinias, ke via supo estas aĉa" Mi respondis:

Kortuŝa rakonto pri saĝa hundo

Kiam mi preterpasis domon mia kapo estis momente je la sama alteco kiel teraso. Subite granda hundo alkuris min bojante, la felo hirtita. Forta kateno retenis ĝin kelkajn centimetrojn antaŭ mia vizaĝo.

Ĉar mi amas bestojn kaj bone konas hundojn mi laŭte riproĉis ĝin:
Silentu, estu trankvila, sufiĉas, sidiĝu! Kiam ĝi ĉesis murmuregi mi alvokis ĝin pli milde: Vi estas bela, brava hundo, donu piedon al mi!
Baldaŭ ĉesis ĝia furiozeco kaj ĝi eĉ eksvingis sian voston.

"Same pri via hundo-kaĉo! vi ja estas nur besto, ne indas diskuti kun vi! Kaj fine, kia strangaĵo, hundo parolanta! Mi ja ne bojas" Ĉu ne!!

Laste, mia hundo sen-averte forlasis

la domon. Ĝi vizitis Pulbazaron, dum mi restis hejme por gardi la domon. Subite aŭdante sonoradon, mi ekbojis anstataŭ malfermi la pordon! Jes, mi vere bojis! Malfeliĉe sonoritis kaj atendis mia hundo kaj ĝi ĉion aŭdis! Fakte de tiam mi ne plu sukcesas regi ĝin! Ĝis nun, ĝi reportis la ŝtonojn, kiujn mi ĵetis. Nun, ĝi ne plu reportas la ŝtonojn, sed eĉ mem ĵetas ilin. Kaj se mi ne reportas ilin akurate, teruran admonon mi ricevas!

Kompreneble mia hundo estas grava persono! Domaĝe, ke ĝi nun ne ĉeestas, ĝi ja povus ĉion pli bone rakonti ol mi! Kiam mi rakontas tion, neniu kredas min! Sed kiam mia hundo tion rakontas, tiam ĉiuj volonte aŭskultas kaj eĉ kredas!

Iun ajn kredas la homoj!
Raymond Devos
Elfrancis AG

Estis tre varme, mankis ombro sur tiu betona teraso. Mi tiuj rimarkis, ke la besto soifas, kaj daŭrigis alparoli ĝin. La granda hundo rigardis min kaj ni ekkomprenis nin. Subite ĝi ekkuris al sia dometo kaj alportis ladan pelvon tenante ĝin inter la dentoj, ĉar ĝi ardis pro varmeco.

Mi plenigis la pelvon per freŝa akvo ĉe la puto de la bieno kaj metis ĝin antaŭ ĝi. Ĝi rapidege ektrinkis, sed antaŭe ĝi donis ĝentile sian piedon al mi. Mia ĝojo rigardi ĝin estis samgranda kiel la ĝia refreŝiĝi.

Serĉi sian pelvon kaj tiel alporti ĝin al nekonatulo, ĉu tio ne estas saĝeco? Laŭ mi ĝi posedis pli da ĝi ol ĝiaj majstroj.

Elgermanigis HWG





La Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj Kantabra Esperanto-Asocio (KantEA) invitas vin partopreni en la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, unue planita de **la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo de 2020**, estas nun prokrastita al **la 9a ĝis la 13a de oktobro 2020** en Comillas (Kantabrio). Urbeto ĉe la marbordo de la nordo de Hispanio, proksima al Santandero, kaj kun grava historia, turisma kaj universitata havaĵo.

Venu kaj ĝuu grandan esperantan kultur-aranĝon en Hispanio. Kontakti la LKK-on se vi deziras ankaŭ kunlabori en la organizado, kaj proponi programeron.

Kaj por antaŭgustumi la etoson de la HEF-Kongresoj.

Organizas: Kantabra Esperanto-Asocio, San Fernando 58, principal 8, ES-39010 Santander, Hispanio. - retadreso: kongreso@esperanto.es

La LKK

**Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista**

**Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020**

<http://ifef.free.fr/IFK2020>

ALIĜILO

por la 72-a kongreso de IFEF
29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020

*Frankfurt (Oder), Germanio
Słubice, Pollando*

Retadreso por aliĝiloj:

ifk.aligo@esperanto.de

Atendos vin ne nur fakaj programoj, sed ankaŭ programeroj por la amikoj kaj simpatiantoj de fervojo, riĉa kultura programo (spektakloj, koncertoj, dancvespero) ktp.

LKK-adreso: BSW-Ortsstelle Werk Kassel
Freizeitgruppe Esperanto
Frasenweg 20-36
DE-34128 Kassel (Germanio)

Kongresa retpaĝo: <http://www.ifef.net>

La diverstemaj fervoj-fakaj prelegoj prezentos fervojajn novaĵojn kaj progresojn. Ne mankos temoj pri la moderniĝo de fervojo mondscale, tiel ke la kontribuo de la fervojistaj esperantistoj al nia kongreso povas demonstri, ke la daŭra evoluo en fervojfaka medio estas inter la plej progresemaĵoj.

Kvankam fervojista kongreso, ĉiuj esperantistoj kaj amikoj de fervojo estos bonvenaj ĉar ĝi estas malfermita al publiko, al la urbo, al ĉiuj kiuj interesiĝas pri Esperanto.

Aliĝilo kaj programo elŝutebla el nia retejo: <http://esperanto.france.est.free.fr>.

**Pro la kronviruso pluraj eventoj estas nuligitaj aŭ prokrastitaj.
Necesas tion kontroli antaŭ ol aliĝi.**

Esperanto-blogoj – alternativaj amaskomunikiloj

Esperantistoj ĉiam estis pioniroj en uzado de novaj komunikiloj, do tuj post la apero de blogoj ili ekuzis tiun eblon. Ekde tiam la nombro de Esperanto-blogoj kreskas kaj iuj el ili jam enhavas centojn da artikoloj. Stano Belov priskribas sian sperton pri serĉado kaj trovado de blogoj de esperantistoj.

La unuaj esperanto-blogoj evidente aperis fine de la 1990-aj jaroj. En junio 1999 jam funkciis la blogo de la ĉina esperantisto Zhu Xin ĉe LiveJournal titolita Taglibro de Nigra Okulo. Fine de 2003 jam ekzistis deko da esperantlingvaj blogoj.

Dum Esperanto-magazinoj dediĉas plejparton de siaj paĝoj al movadaj aferoj, kaj alitemaj publikaĵoj ofte grave malfruiĝas, blogantoj rakontis pri io ajn – de sia persona vivo ĝis siaj hobiaj, politikaj vidpunktoj, religiaj kredoj kaj vojaĝoj. La ebleco komenti la blogaĵojn kaj tuj ricevi reagon transformis tiun amaskomunikilon je simbiozo de gazeto kaj reta diskutejo.

Dum longa tempo la plej granda esperanto-blogaro (ĝis 2000 anoj) troviĝis ĉe la retejo Ipernity, kiu estis inter la unuaj komplete esperantigitaj interfacoj. Fine de 2016 ĝi anoncis sian fermon, kiu estis prokrastita danke al klopodoj de la reteja komunumo, tamen instigis multajn anojn transloki siajn blogojn. Ekzistis pure esperantlingvaj blagejoj kiel Ĝangalo (2005-2006) kaj Esperanto.com (2010-2018), tamen ambaŭ fermiĝis.

La ĉefa problemo ekde la komenco estis la sama, kiun spertas la Esperanto-komunumo ĝenerale – diseco. Kiel leganto trovu interesan blogon kaj kiel bloganto trovu legantojn? Nura guglado montras aron da ligiloj, plejparte neniel aŭ nur malproksime ligitajn al la afero. Do ekde la komenco aperis la bezono listigi esperanto-blogojn kaj diskonigi esperanto-blogaĵojn.

Tion klopodis fari la esperantlingva retejo Klaku, fondita en 2007. Ĝi ebligis interalie voĉdoni por aŭ kontraŭ iu ajn publikaĵo, respektive altigante aŭ malaltigante ĝin en la komuna listo. Fine de la 2000-aj jaroj la retejo kolapsis.

Ekde tiam la diskonigo de esperanto-blogaĵoj okazas ĉefe danke al esperanto-grupoj en sociaj retoj, el kiuj la plej granda estas Esperanto-blogoj ĉe Fejsbuko. Inter la portaloj rimarkindas E-planedo, kiu estis establita en februaro 2005 kaj funkcias kadre de la platformo Planedo. Listoj de esperanto-blogoj haveblas ĉe kelkaj privataj blogoj kaj retejoj. Ilia ĉefa manko estas malzorgema aktualigo, pro kio multaj listigitaj ligiloj ne plu funkcias aŭ la blogoj ne estas daŭrigataj. La plej granda listo enhavas 2692 ligilojn, sed 90% da ili kondukas al blogoj, ne aktualigataj aŭ ne plu ekzistantaj.

Kiel malnova bloganto, kies blogo Stano funkcias ekde 2010 kaj enhavas pli ol 415 artikolojn, mi decidis plibonigi la situacion, kreinte almenaŭ bazan gvidilon en tiu granda, sed svaga mondo de Esperanto-blogoj. Kiel platformon mi elektis Vikipedion, ĉar la historio montris ke ĉiuj apartaj, pure esperantistaj projektoj sen-evite kolapsis aŭ transformiĝis je neuzablaj rubuoj, dum tiuj neesperantistaj funkcias sufiĉe stabile.

Mi kreis la artikolon Esperanto-blogo, en kiu mi skizis la historion de la blogado en la Lingvo Internacia kaj katalogis elektitajn blogojn. La ĉefaj kriterioj estis la nombro de artikoloj (minimume 10), lingva nivelo kaj kvalito de la publikaĵoj (el mia persona vidpunkto). Al la priskribo de ĉiu blogo mi aldonis informojn pri ĝiaj aŭtoro, lando, datoj de estiĝo kaj (foje) ĉeso, ĉefaj temoj. Foje iuj datumoj mankis, do en tia loko aperis demandosigno.

Kiel mi serĉis la blogojn? La ĉefaj fontoj estis Ipernity kaj la menciitaj listoj kaj katalogoj de Esperanto-blogoj. Mi sekvis centojn, eble milojn da ligiloj, kribrante informojn kvazaŭ orserĉanto, ja post kelkhora umado en plej bona kazo aldoniĝis deko da priskriboj. Sume mi katalogis 62 blogojn, kiujn mi konsideras legindaj kaj (se plu aktualigataj) sekvindaj.

La temoj estas diversaj, kvankam Esperanto (movado, lingvaj esploroj, kulturo) certe elstaras kaj allogas plej grandan atenton. Tamen jam aperis kaj vige evoluas pluraj blogoj pri la temoj propraj al iu ajn

ordinara homo – politiko, muziko, vojaĝoj, hobiaj ktp. Oni komunikas tie ne kiel esperantistoj kun esperantistoj, sed kiel homoj kun homoj, inkluzive kiel britoj kun poloj, judoj kun rusoj, hispanoj kun katalunoj, ktp.

La informoj ĉerpitaj el tiuj blogaĵoj, estas interesaj kaj utilaj por la ĉiutaga vivo de ordinara homo kaj rakontindaj al aliuloj ne-esperantistaj. Oni povas trovi veganan kuirrecepton, ekscii pri nuancoj de la kataluna politika vivo, konsulti vojaĝinformojn pri vizitota loko aŭ kompari siajn impresojn pri filmo kun tiuj de aliuloj.

Dum retejoj de plejparto de Esperanto-asocioj stagnas kaj ofte aspektas kiel dinosaŭroj de interreta antikva epoko, Esperanto-blogoj iĝas fakte la sola fonto de aktualaj informoj, interesaj por ordinara homo, kiu konas Esperanton kaj deziras uzi ĝin, sed ne tre emas svingi verdajn flagojn kaj kanti himnojn surstrate. Reta solvo por la reta epoko. Logika solvo, ĉu ne?

Stano Belov

El "Libera folio"



El nia libroservo

Informoj



⇒ Pro la epidemio de kronviruso, estis nuligita la 87a regiona staĝo de Esperanto, kiun planis partopreni la libroservo. Tiu-ĉi refunkcios dum la venonta komuna semajnfino.

Sed ne eblas nun scii, kiam kaj kie.

⇒ ankaŭ ne alvenis novaj libroj!

⇒ la listo de akireblaj libroj aperas en esperanto.france.est.free.fr: nia libroservo.

Vi daŭre povas mendi iujn librojn Sed mi povos ilin sendi nur kiam estos denove eble en Francio eliri el la hejmo!

⇒ Gardu la sanon! Kaj se vi estas devigata resti hejme: bonan legadon!

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net

Por mendi librojn:


1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

Rememoroj kaj Adiaŭ al TRIXINI

2-3/2015 de Judita Rey Hudeček el Kroatio

- *Saluton Judita, kiel vi fartas? Kio nova ĉe vi?*
- *Plimalpli bone. Kaj vi?*
- *Nun sufiĉe bone, pli poste mi vidos kaj pro kio mi vokas... Nome, mi baldaŭ mortos, kaj nun mi ne plu havas tempon por korespondi kun geamikoj. Mi nun devas nur okupiĝi pri tio ke mi ne suferu tro...*
- *Ho, Trixini ne ŝercu tiel, ne parolu stultaĵojn... Lastfoje kiam vi longe ne skribis kaj ni timis, ke vi estas malsana, vi ne skribis ĉar vi estis en la ĉielo, sed pro la amo, ne pro la morto...*
- *Ne, Judita, ĉifoje estas vere serioze. La kuracisto montris al mi miajn kontrol-rezultojn kaj la radiografian bildon...*
- *Vi ja scias, ke kuracistoj estas same kiel vi magiistoj, eble nur ŝajnas tiel...*
- *Ne, kara ne, ne ... ĉio klaras. Mi nur volis ankaŭ buŝe adiaŭi de vi. Mi jam skribis leterojn por miaj geamikoj, iu sendos ilin kiam mi mortos, por ke vi sciu. Dankon por via amikeco kaj kiam vi ricevos ĝin ne estu trista. Vi ja scias, ke mi estas religiema homo kaj mi nek timas, nek bedaŭras pro baldaŭa foriro. Kiam homo naskiĝas, jam li scias, ke tiu momento venos... Mi nur ne volas tro suferi, kaj tio restis mia lasta ankoraŭ nesolvita tasko... Ĝison kara, fartu bone kaj salutu vian familion kaj ĉiujn geamikojn...*



Post tiu ĉi telefonado mi ankoraŭ dufoje telefonis al li. Neniu respondis. Kiel kutime, mi lasis mesaĝojn. Trixini multe aktivis ekster la domo. Reveninte hejmen, vespere li kutimis voki min por rakonti pri siaj prezentaĵoj, libroj, planoj... Ĉi-foje li ne retelefonis. Anstataŭ tio venis la letero, ordeme adresita de li, ornamita per Esperanto-glumarkoj. Krom lia letero, kiel kutime estis fotokopioj de iuj ĵurnalaj artikoloj pri lia agado. La letero estis adiaŭa, skribita fare de li kaj iu aldonis nur la daton...

Li petis min transdoni al ĉiuj geamikoj liajn salutojn kaj diri, ke neniu estu trista. Ĉu tio eblas? Hansjörg Kindler, nia kara Trixini, ne estis amiko kun kiu ni ĉiutage telefonis, sed li estis ĉiam atingebla, kiam ni bezonis lin. Li estis parto de nia vivo, kaj de la vivo de multaj homoj dise tra la mondo. Ne multas tiom raraj homoj en la mondo, kaj ni kies amiko li estis, estis veraj feliĉuloj.

Estas malfacile diri, kiam kaj kiel li ekestis nia ci-amiko. Kun zagrebaj esperantistoj li estis bindita per diversaj fadenoj: kiel esperantisto, kiel pupisto, kiel mondvojaĝanto, kiel humanisto... Sed tio estas nur kelkaj flankoj de lia personeco. Aliajn ankaŭ tre rarajn mi malkovris tute hazarde, foliumante lian fotoalbumon, dum mia gastado ĉe li.

- Trixini, ĉu tiu ĉi albumo estas el viaj lernojaroj? Tio estas vi, sed kial apud la nomo de viaj samklasanoj estas skribite: grafo, princino, barono? Ĉu vi tiel kutimis doni kromnomojn?

- Ne, ili ja vere estis grafoj, dukoj, baronoj, aŭ gefiloj de riĉuloj. Vidu, tiu ĉi knabino estas fratino de la nuna hispana reĝino Sofia, la princino de Grekio, tio estas la princo de...

- Mi ne plu memoras, kiu ili estis, sed mi miris pro la fakto, ke mia amiko finis la lernejon Selem, kiun frekventas nur nobeluloj kaj infanoj de milionuloj! Sed la rakonto pri tio kiel tiu fama lernejo invitis lin esti ilia lernanto jam estas okazaĵo, kiu okazas nur al de Dio benitaj raruloj.

Li estis tiom rara, ke post la abituro li decidis ne uzi la diplomon de tiu ĉi fama mezlernejo, sed studi ion eksterordinaran. Li decidis studi teologion kaj ekesti simpla katolika pastro! La patro Kindler, sufiĉe bonhava, sed ne tiom religiema persono koleriĝis. Pensante ke la filo ne eltenos sen lia financa helpo, li decidis ne sendi al li la monon por studado. Sed iama kolego de princoj kaj princinoj ne volis ŝanĝi sian decidon. La monon li perlaboris surstrate per siaj hobioj: pluĵado kaj magiado. Li finis studadon kaj estis katolika pastro 16 jarojn. Sian laboron li ŝatis, sed por malpacienca kaj maltrankvila homo ŝanĝoj en la fortika sistemo de la katolika eklezio estis tro malrapidaj. Li decidis iri sian propran vojon kaj helpadi homaron.

La virino kun li edziĝis havis filinon kaj li iĝis bona patro de hodiaŭ sufiĉe fama artistino.

- Kaj kiu estas tiu persono sur la foto kun subskribo, kiu staras sur ŝranketo en angulo?

- Tio estas Dalaj Lamao.

- ??? Ne diru, homo! Kiajn rilatojn vi havas kun li? Li certe ne estas esperantisto nek estis lernanto de Selem...

- Ne, tio ne. Sed pri Esperanto mi ja skribis al li...

- Kaj li pro tio sendis al vi sian foton kun subskribon?

- Ne, ni fakte interŝanĝis telefonkartetojn...

- !!!???

Jes, tia estis nia Trixini, unu el la plej bonaj eŭropaj magiistoj, kaj portanto de la fingroringo kun Blua ŝtono.

Pri li oni povus skribi romanojn, sed mi menciis ankoraŭ nur tion, ke dumilite li ne povis trankvile sidi en sia domo en Germanio, kiam ni homoj suferis.

Li venis al Kroatio por vidi kiel li povus helpi, kion homoj bezonas... La helpadon pere de iu ajn organizo li volis eviti...

En rifuĝeja centro en Savudrija (Kroatio) li helpadis bosnianojn, ekestis laŭ ilia kutimo bopatro de iu muzulmana knabino ktp...

En Zagrebo li komprenis, ke mi okupiĝas pri hanidkapuloj. Dank' al lia helpo ili komencis rajdi, naĝi, partopreni e-renkontiĝojn kaj eĉ magiumi. La boneco estas kiel kandeloj. Ilia lumo ne perdas sian forton se oni fordonas sian fajron al aliaj homoj.

Oni povus ankoraŭ longe, longe paroli pri nia kara Trixini. Sed pli bone ol paroli estas daŭrigi la laboron de tiu ĉi nekutima, kaj senlime bona homo. Ni, liaj geamikoj, pro tio fondis la societon, kiu kunigos almenaŭ kelkajn liajn ecojn.

Judita Rey Hudeček

Filma konkurso "Mia Asocio, Mia Urbo".

diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj. Por partopreni kandidatoj devis provizi al la organizantoj mallongan filmon kaj artikolon prezentantaj la Esperanto-asocion kaj kelkajn kulturaĵojn de sia urbo antaŭ la 30-a de novembro 2019. La filmoj kaj la artikoloj devis esti en Esperanto, kaj la plej bonaj ricevos premiojn, kiuj povas inkluzivi repagon de

Kadre de la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) kaj de la agado por Ĝemelaj Urboj de UEA, ĈRI kun UEA lanĉis la filman konkurson "Mia Asocio, Mia Urbo".

La konkurso celis diskonigi Esperanto-asociojn en vojaĝo al Montrealo, Kanado, por la 105-a Universala Kongreso, kie la premiotaj filmoj estos prezentitaj. Bedaŭrinde, ni tro malfrue malkovris tiun projekton por partopreni. La filmetoj videblas en tiu jutuba retpaĝo de UEA

(https://www.youtube.com/playlist?list=PLFebd4xxn3CMe10A17DnGnx0p2hww0_i2)

Ĉi-sube vi povos spekti unu el ili kiu temas pri la urbo Minga Guazú en Paragvajo.

https://www.youtube.com/watch?v=HRCqHyf_YY&t=103s



PRINTEMPOS

Ĝuu semajnon en la Esperanto-kastelo!
17–25 de aprilo 2020



Esperanto-kursoj
por ĉiuj niveloj



Aktivadoj
kaj ekskursoj



Prelegoj, kon-
certoj kaj atelieroj



Trapasu Esperanto-
ekzamenon (KER)

Instruos:



A1-A2:
Marion
Quenut



B1:
Christophe
Chazarein



B2:
Szabolcs
Szilva



C1:
Przemek
Wierzbowski

Pliaj informoj kaj aliĝilo:
gresillon.org/p




De la 17a ĝis 25a de aprilo okazos en la franca Esperanto-kastelo Grésillon intensivaj kursoj en 4 niveloj kaj KER-ekzamenoj, legu: gresillon.org/printemps Bonvolu informi viajn E-amikojn. Kontakto: kastelo@gresillon.org

Du 17 au 25 avril auront lieu au château de l'espéranto de Grésillon des cours intensifs à 4 niveaux et examens CECRL voir : gresillon.org/printemps Merci d'informer vos amis espérantistes. Contact : kastelo@gresillon.org

Laste ni eksciis, ke tiu aranĝo estas nuligita aŭ prokrastita. Necesas informiĝi

Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj



G.J.

Ernesto konfesas al amiko:

"Pro tro da fumado mi tute perdis la senton pri gustoj. Tial mia edzino sukcesis konviki min ĉesigi fumadon kaj tabak-uzadon. Post iom da tempo mi efektive denove kapablis senti la gustojn de ŝiaj kuiradoj.

-Kaj ?

- Tion mi ege bedaŭris, tial mi denove fumas!"

Ĉe la fino de siaj ferioj, tiu feriinto vizitas vendejon de vivantaj bestoj antaŭ ol hejmenveturi.

"Ĉu vi havas pulojn? Ducent... kaj ankaŭ cent cimojn!"

-Strange! miras la vendisto, tiajn bestetojn mi tute ne havas, sed tamen, diru al mi, kial vi ilin bezonus!...

- Mi forlasis mia luitan ĉambron, kaj tiam mi legis afiŝeton sur la pordo, kiu postulis:

"Bonvolu remeti vian loĝejon en la saman staton, tia, kia ĝi estis ĉe via alveno".

La eta Roberto revenas hejmen plorante. La patro scivolemas:

"Kio okazis?"

- mi ricevis nulon pro malbona respondo en geografio... mi ne sciis, kie troviĝas Slovakio...

- Nekredeble... Alportu al mi la mapon de Francio, tiam mi povos montri al vi..."

La patro okulumas kaj traserĉas...

"Tiu mapo ne estas sufiĉe detala. Alportu tiun de la regiono..."

Sed same li ne sukcesis trovi, kaj grumblante pro la malsukceso, li asertas:

"Mi tamen certas, ke Slovakio troviĝas tute proksime. Mia slovakia amiko venas ĉiu-tage per biciklo al la uzino".

HORIZONTALE:

1. Barilo por eviti defalon.
2. Antaŭenmov'. Ceremoni'.
3. Grup'. Kontraŭaj'.
4. Person' kiu riparas veturilojn.
5. Koro de la patrio. Norvega urbo.
6. Klink'. Verki ion (*inverse*).
7. Trempigi en kolora likvo por presi. Ujo por pano.
8. Malkompleta "servo". Plantoj kun labiaj floroj.
9. Ago en politika grupo. Dano sen kapo.
10. Parfum'. Vigl' (*inverse*)

VERTIKALE:

1. Hinda religio.
2. Mezforta vent'. Pikil' de rozo (*inverse*).
3. Artikolo. Pollanda urbo.
4. Ŝtat' en Orienta Eŭropo. Ar'.
5. Subpart' de akto. Ludo sen vokaloj.
6. Osto. Senorda konfuz'.
7. Postulat'.
8. Soldat'.
9. Supernatura estaĵ'. Pariza universitato.
10. Aro (*inverse*). Nordamerika best'.

En la familio oni interkonsentas por decidi pri la loko de la venontaj someraj ferioj. La dek-sep-jara filo, certagrade "moderna knabo", ĝis nun silenta, subite enmiksiĝas:

"Mi ŝatus iri al iu loko, kie mi jam delonge ne estis..."

Tiam tuj reagis la patro kaj malfermante sian monujon, admonas:

"Jen dudek-eŭroj... kaj iru al frizisto!"

Iu hotelgasto iom ebria je tiu nokta horo, klopodas manipuli ion en kabino de la ter-etaĝo apud la ŝtuparo... Finfine li eliras kaj atentigas la deĵoranton:

"Ĉu vi scias, ke la lifto tute ne funkcias, jam plurfoje mi provis.

- La lifto estas en ordo, estimata sinjoro, sed nun vi jam de duonhoro staras en telefonbudo. Ĉu vi provas alvoki ripariston?!"

SOLVO KVE 188

Horizontale:

1.PREDIKATIV. 2.AEROLIT. RE 3.LO. JUNULIN. 4. ESPER. TATU. 5.OTON. NOS. 6.LAK. LARD. 7. ITERACI. 8.REGIMENR. 9.IN. MUS. NUR. 10. KORINTIKA.

Vertikale:

1.PALEOLITIK. 2.REOSTAT. NO. 3.ER. POKER. 4. DOJEN. REMI. 5.ILUR. LAGUN. 6.KIN. PACIST. 7. LAND. ENK. 9.IRITO. UNUA. 10.VENUSO. TR.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2020 ĝis 2022

La abon-periodo 2019 jam finiĝis per la lasta numero 188. Ĉi-tiu numero 189 jam estas la unua de la jaro 2020. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 190 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2020.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE ktp.) kaj eventuale pago por la sekvantaj jaroj 2021 - 2022

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "*Via abono estas finita, ni petas reabonon*", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2020. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo. Vi trovos aldonitan abonilon je via nomo.

Krome nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de viaj impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

		Jaroj:	2020	2021	2022
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2020	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2020 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al la jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2020, 2021				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la Dua

Mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala.

12 + 3,80 = 15,80 eŭroj

Momorige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio)

4+1,90=5,90 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig

1,50 + 1,90 = 3,40 eŭroj

Etaj rakontoj pri la Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio

ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo

12 + 7,8 = 19,80 eŭroj

Konstruado-kajero de TAKE 2019

La tiama temo estis "Pavimo" kun 9 artikoloj de diversaj aŭtoroj

6+2=8 eŭroj

Konstruado-kajero de TAKE 2020

La ĵus aperinta kajero kun la temo "Fenestroj" kun 15 artikoloj de diversaj aŭtoroj

6+2=8 eŭroj

RAKONTO PRI AGADEROJ DE AFRIKA CENTRO MONDCIVITANA/ACM BENINO.

Kio estas ACM Benino?

Ĝi estas "Afrika Centro Mondcivitana", neregistara organizo fondita en 2010 en Benino sub la No 3/134/PDM-CSG/STCCD kaj agnoskita de la benina ŝtato. Ĝi estas enskribita en la benina oficiala ĵurnalo kaj havas registrad-numerojn No4 du 15/02/2011 pri kiu François Hounsounou estas la fondinto post la tejo-estraraniĝo.

Kian rolon ĝi ludas?

Ĝi estas sociala asocio. Ĝi subtenadas georfojn, malriĉajn infanojn. Sed Kiel?

Ĝi edukade pagas la lerno-koston de geinfanoj, kiuj frekventas. Ĝi kolektadas lernejaĵojn kaj disdonas je la komenco de klaso, ĝenerale en septembro. Escepte ĝi helpas la geinfanojn, kiuj ne iras al la lernejo kaj ŝatus lerni metion: kudradon, frizaĵadon kaj aliajn.

Ĝi ricevis francajn kaj germanajn volontulojn, kiuj projekte agadis en Benino. La ĉefa problemo de ACM estas manko de monfonto. Ĝi monkolektis en esperantujo, kiu neniam kovris la bezonojn de geinfanoj. Fernando Maia tre volonte akceptis kaj transprenis la pagon de lernokosto por 35 geinfanoj jare. Malgraŭ tiu kontribuo, ACM ne sukcesis. Alia problemo okazas post la akirita abiturienta ekzameno. ACM ne plu kapablas daŭrigi la subtenon al tiuj infanoj. Estas dolorige por ni vidi la finon de la studado de kelkaj geinfanoj tuj post la bakalaŭro.

La financa situacio de Fernando ne plu boniĝas pro la politiko en Brazilo. ACM ne kapablis ion fari al la geinfanoj sub ACM.



Kelkaj geinfanoj estis patronitaj. Pro perdo de laboro ili ankaŭ ne plu daŭrigas la patronadon. Estas malfacile respondi al la bezonoj. Bv scii ke ACM nek estas orfejo nek lernejo. Ĝi subtenadas familie. Kelkaj vivas kun la fondinto. Dum la lernojaroj 2019-2020 la infanoj ege suferas



pro manko de lerno-materialoj kaj pro lernokosto. Ni bonvenigas lernejaĵojn, vestaĵojn, donacantojn (lernokoste) cele al subtenado edukade la infanojn.

Kial esperanto- projekto?

ACM regule gastigas en esperantujo. Ekster-afrikanoj vizitis nin kaj tranoktis en nia domo preskaŭ ĉiu-jare. Escepte estas ankaŭ kelkaj neesperantistoj el aliaj asocioj "Kiel Servas International". Do la geinfanoj ne sukcesis paroli kun la esperantistoj, kiuj vizitis nin. Estis same dum la vizito de Fernando Maia. Pro tio li decidis, ke ni varbu esperanto-instruiston, kiu instruados en la centro ne nur al la geinfanoj sed ankaŭ al la popolo de kie la nomo " **Volontula-Instruado de Esperanto en Afriko**". Ni varbis la unuan volontulon, kiu estas togolandano. Li instruadis dum unu jaro kaj duono. Post tiu etapo, ni lanĉis alvokon por la dua etapo. Bv salti al nia paĝo por konatiĝi kun niaj aktivaĵoj <http://www.acmbenin.org> Ni invitus kaj petus al vi ĉiuj subteni niajn agaderojn.

Por pliaj informoj, bv kontakti acmbenin@gmail.com, hounfranc1@yahoo.com

Solidara ferio

Por tiuj, kiuj ŝatus periode labori, amuziĝi kun la geinfanoj, ni bonvenigas ilin julie-septembre. Bv anonci vin du semajnojn antaŭe.

Raportis François Hounsounou.

Fondinto de ACM Benino.



La 18a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden 27. 12. 2019-3. 1. 2020

Post unu jaro denove okazis en la junulara gastejo de Wiesbaden renkontiĝo por bonvenigi kaj festi Novan Jaron kun geamikoj. La eventon ĉeestis iom pli ol du cent geesperantistoj el diversaj partoj de la mondo. De pli malproksime venis partoprenantoj el Israelo, Kanado kaj Koreio. La striko de la francaj fervojoj kaŭzis malfacilaĵojn por tiuj, kiuj intencis alveni trajne el Francio. Samtempe kaj samloke okazis la 11-a NIS (Novjara Internacia Semajno) por infanoj kaj gejunuloj, kiuj povis ĝui abundajn programerojn.



Post la bonvenigaj vortoj de la ĉeforganizanto

Lu Wunsch-Rolshoven dum la interkona vespero ni povis gustumi diversajn frandaĵojn alportitajn de la partoprenantoj. Jam la sekvan tagon okazis la urbo-gvidado tra Wiesbaden, kiu konigis al ni la plej vidindajn lokojn. Dum la semajno eblis viziti glaci-sketejon, muzeon, termobanejon, bahaan templon aŭ ĝui la Novjaran promejon.

La programo estis riĉega kun altnivelaj prelegoj kaj interesaj diskutrondoj. En diversaj prelegoj oni pritraktis klimaton, mediprotektadon, ekologion, kio fakte estis la kadra temo. Okazis diversaj Esperanto-kursoj kaj serio da lingvaj temoj. Prelegoj "Kiel prezenti Esperanton al pli ol cent infanoj", "Kiel iĝi poligloto: teknikoj pri lingvaj interŝanĝoj", pri "Sensuala plezuro de la prononco", "Malĝustaj asertoj pri Esperanto", "Rilatoj inter lingvoj kaj matematiko" allogis la esperantistojn.

Estis prezentata la Esperanto-kulturo tra 50 jaroj de Literatura Foiro. Ni ankaŭ eksciis kial la francaj pol-devenuloj jubileas, kiel Euklido inventis matematikon kaj pri aliaj matematikaj misteroj. Oni parolis pri la vivkvalito, pri sana manĝado, pri kolesterolo, pri bicikloj kaj arto. Eblis sperti ĵongladon, sorobanon, rubikkubon, ĉigongon, malstreĉigan gimnastikon aŭ ĉeesti Sukuro-kurson de unua helpo.



Ĉiutage okazis diskutoj pri diversaj aktualaj temoj. "La nova silka vojo", "Virinaj rajtoj", "Rusia ekspansio", "Financado en politiko", "Klimataj ŝanĝoj-ĉu koŝmaro aŭ oportuno", "Katalunio/Hispanio, Skotlando/Britio, du modeloj de sendependiĝo". Krome interesis prelegoj "La Luno: 50 jaroj post la unua paŝo sur ĝi", "La egipta vojaĝo al la transa mondo", "20 jaroj de Reta Vortaro", "Leonardo kaj Rafaelo, kiu superis kiun?", "Kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio".

Iuj interesiĝis pri dutaga seminario "Ĉu vi volas pravi aŭ feliĉi?" bazita sur la procezo SenPerforta Komunikado (SPK). Kolektiĝis ankaŭ amikoj de EsperantoLand. Estis prezentata la venonta UK en Montrealo kun diversaj planitaj ekskursoj. Bicikla vojaĝo portis nin de Tromsø al Porto.





Estis prezentataj diversaj filmoj, pup teatraĵo pri Aleksandro kaj la mekanika muso, japana teatro Kamiŝibajo, fotoj el pasinta NoRo, Novjara koncerto de diversaj artistoj. Vesperan koncerton prezentis "Inicialoj DC".

Okazis tablo-tenisaj turniroj, verkado de poezio, kantado, muzikado, israelaj dancoj, zumba, biergustumado, vortludoj kaj kvizoj. Ne mankis manlaboroj, fabrikado de ornamaĵoj, trikado de polpetoj kaj aliaj aĵoj... En la halo estis instalita kesto por libroj alportitaj de partoprenantoj, kiujn oni povis libervole preni aŭ interŝanĝi.



Libroservo proponis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Je dispono estis diversaj tabloludoj kaj puzloj. El ruboj kolektitaj ekstere infanoj faris diversajn artaĵojn. Krome ili spertiĝis pri origamio, feltumis, faris bildojn el diversaj semoj, plektis braceletojn kaj ŝatis frandi ĉokoladajn bananojn.



Post la Silvestra bufedo ni bonvenigadis diversajn Novjarojn kaj dancis ĝis frumateno. Estis prezentataj kantoj por la Festivalo de la Paco, organizata de Unesko, kiu okazos la 19-an de septembro 2020 en Tolosa (Hispanio). La tekstoj devas esti tradukitaj al unu el

la kvar laborlingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto.



Dum la Internacia vespero ni spektis ĵongladon, ĝuis kantadon, dancadon, akrobataĵojn kaj aliajn kontribuadojn, prezentataj de niaj ĉiuaĝaj talentuloj. Post la vesperaj programeroj interbabilado daŭris en gufujo. Ĉe la fino de la aranĝo sursceniĝis ĉiuj kontribuintoj de la diversaj programeroj, kiujn oni dankis per forta aplaŭdo.

Dum la tuta semajno regis agrabla Esperanto-etoso.



La 18-a NoRo estis sukcesa, ĉiuj entuziasme kunlaboris kaj promesis veni jarfine denove en la saman lokon por komune amuziĝi kaj ĝui la semajnon.

Liba Gabalda

*



Jen raportas pri sia partopreno en la 18a Novjara Renkontiĝo Lydia Bloch

La 18a **Novjara Renkontiĝo** (nomata NoRo) de **ESPERANTOLAND** okazis de la 27a decembro ĝis la 3a de januaro, denove en Wiesbaden (Germanio, 40km okcidente de Frankfurto ĉe Majno).

La partoprenantoj loĝis en junulargastejo kun tre multaj salonoj kaj aliaj eblecoj por renkontiĝi, agi. Partoprenis iom pli ol 200 gastoj -inter ili, kiel kutime, sesdeko da infanoj kaj junuloj (inter 12 kaj 20 jaraĝaj). Por ili, sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (N.I.S.).



La partoprenantoj venis el ĉirkaŭ 10 landoj: 105 el ekster lando, 108 el Germanio, por **KOMUNE FESTI LA NOVAN JARON**.

Multaj partoprenantoj ankaŭ proponis aktivaĵojn, do ekestis tre granda elekt-ebleco por ĉiuj! Kaj ege diversaj! Oni povas elekti dum la tago inter 4 aŭ 5 programerojn! Estis proponitaj Ĉigongo, diversaj dancoj, malstreĉiga gimnastiko, tablo-teniso...vizito al Wiesbaden, novjara promenado...!

En iu salono oni povas laŭdezire ludi, tie multaj ludoj atendis la interesatajn. Evidente eblis lerni esperanton! Ĉiu-tage okazis kursoj por komencantoj, progresantoj, kaj pri gramatiko! Riĉa

libroservo, kie agrable atendis nin Gerd aŭ alia deĵoranto, preskaŭ dum la tuta tempo!

KADRA TEMO: Klimato, mediprotekto, ekologio, plasto-evitado;

Pri tiaj temoj: kelkaj renkontoj, prelegoj. Ankaŭ praktikado: trikado de ekologiaj laveblaj reuzeblaj laviloj kaj aliaĵoj...Alia trikado por fari mirindajn lanajn bestetojn (por la dekoraĵo, kaj poste por doni al malsanaj infanoj, ekstere).

Sed ankaŭ aliajn temojn oni diskutis: lingvo, literaturo, virinaj rajtojn, pri la "nova silka vojo", financado en politiko...Ankaŭ verkado de poezio estis proponita.

Ankaŭ filmoj, prelegoj pri scienco, pri Esperanto, fotojn de NoRo 2018 prezentis Brian, kiu la tutan tagon ĉeestis ĉie por foti ... supozeble por prezenti venont-jare

Kaj tre multaj eblecoj por kanti, prepari kaj prezenti koncerton, Tian etoson mi tre ŝatis: oni ofte aŭdis kanti, muziki, kaj eblis ĉeesti belegajn koncertojn aŭ iajn spektaklojn vespere: mirinda Pupteatro de Christoph, kvarvoĉa koruso, novjara koncerto. . .

Eĉ se mi mem ne profitis (ĉar mi bezonas dormi sufiĉe), multaj ŝatis iri, post la programo, por ĝui momentojn en agrabla loko kaj specifan etoson en "Gufujo".

Mi nepre devas paroli pri la aparta programo por infanoj, ĉiu-vespere, "piĝama renkontoj" por etaj. . . kaj malpli etaj infanoj kaj granduloj. Kaj parto de ĉiu tago, aliaj ludoj kaj specifaj programoj, kun aŭ sen gepatroj.

La gejunuloj havis propran programon, kaj ankoraŭ povis partopreni al granda parto de ĝenerala programo, Bela familia etoso! Kune oni preparis dekoraĵojn por la granda vespero, la ege ŝatata **SILVESTRA FESTO Mardo 31a de decembro!!**

Antaŭe oni preparis dekoraĵojn, lokojn, kaj programon. Jesper J. prezentis sian "Kvarvoĉan koruson", kaj aliaj koncertis aŭ ludis por ni ĉiuj post la Silvestra bufedo, ĉiuj kalkulis laŭt-voĉe la lastajn sekundojn de 2019. Poste ni interŝanĝis kisojn, ek

de la unua sekundo de 2020! Por bondeziri "**Feliĉan novan jaro**", kun glaso en unu mano. Poste ni dancis, laŭ multaj diversaj muzikoj, Lastaj iris dormi ĉirkaŭ la 6-a matene. . .

Merkrede la programo komenciĝis nur je la 10a, kompreneble! La novjara promenado, sub agrabla suno, ebligis malkovri parkon kaj belan malnovan rusan kvartalon.

La programon ni ankoraŭ ĝuis dum 2 tre belaj tagoj. Antaŭ ol foriri hejmen vendredela 3an de januaro frumatene. (sed post la matenmanĝo!).

Mi volas diri, kia bela skipo preparas la renkonton, Ĉefe LU, sed ankaŭ Betti, Klaŭs, Laŭrent. . .kaj multaj, kiuj preparis parton de tia riĉega programo aŭ zorgis pri teknikaĵoj. .

Mi ne povis ĉion diri! Ĉiu-matene oni trovis tabelon kun la programo de la tago, kio, kaj kie!

Ĉe la alveno ni ricevis dokumenton kun la tuta programo kaj la tre utilan skemon de la domo kun la diversaj lokoj.



**La 18-a NoRo
2019/2020
en Wiesbaden**



La 14a MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2020



Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

29a de februaro – 7a de marto 2020

Jen la tradicia printempa rendezuo por pluraj samideanoj, kiuj deziras kune ĝui la komenciĝantan printempon en agrabla Esperanto-etoso inter gesamideanoj.

La hotelo Vacanciel plene taŭgas por tia internacia semajno ĉe la Lazura Marbordo proksime de Saint-Raphaël en Les Issambres.

La lastan superjaran tagon de februaro, la belega hotelo kaj feriejo *Les Issambres* akceptis centon da esperantistoj el diversaj landoj. Pro la korona-viruso *COVID-19*, disvastiĝanta fine de decembro en Ĉinio en la urbo *Wuchan* kelkaj rezignis sian partoprenon. La viruso atingis Eŭropon en februaro kaj rapide disvastiĝis en pluraj landoj kaj tiam furoris precipe en Italio. Pro ĝi nekutima situacio okazis: ĉe la alveno en aero ŝvebis nur flugantaj kisoj sen ĉirkaŭbrakoj. Venis esperantistoj el Francio, Belgio, Hispanio, Svedio, Italio, Finnlando kaj Rusio. Kun Katerina



Arbekova el la urbo *Novosibirsk*, (kiu gvidis pasintjare la E-kurson) venis grupeto da gejunuloj, kiuj kun granda entuziasmo ĝuis kaj praktikis Esperanton.

La direktoro de la hotelo s-ro Silvain Ceccoto bonvenigis nin sabate antaŭ la vespermanĝo per aperitivo kaj deziris al ni agrablan restadon. La programeroj de la feriejo, kiujn ni povis partopreni, proponis diversajn ludojn, arko-pafadon, kvizon, malstreĉigan gimnastikon, loterion, minigolfon, diversajn ekskursojn, dancadon kaj aliajn amuziĝojn.

Ankaŭ nia tutsemajna programo estis riĉa. Okazis kvar diversnivelaĵ kursoj pri Esperanto.

Mikaelo Bronŝtejn



Monique Arnaud
proponis la nepalan
saluton anstataŭ
kisadon.



Komencantojn instruis Christine Graissaguel, tiujn, kiuj jam lernis kaj komprenas la lingvon gvidis Elisabeth Ledru (nomita Elinjo). Pli lingve progresantaj partoprenantoj paroligis Nina Korĵenevskaja kaj por la plej spertaj Mikaelo Bronŝtejn pretigis varian programon; iom da gramatiko, kvizo, ŝercoj, kantado kun akompano de gitaro. Krome li donis al ni multajn informojn pri soveta Esperantomovado kaj pri famkonataj rusaj Esperantistoj. Ĉiuj kursoj agrable

disvolviĝis kaj la lernantoj estis kontentaj. Dum la paŭzoj Monique Prezioso kaj Simone Marlier pretigis kaj servis al ni kafon, diversajn infuzaĵojn kaj biskvitojn.

Ni vizitis la urbojn *Frejus* kaj *Roquebrune-sur-Argens*. Iuj individue veturis al *Saint Tropez*, kiu distancas nur dek kilometrojn de *Les Issambres*. Pro la pluvo kaj la forta vento la vizito al la lagetoj *Villepey* ne povis okazi. Tiam estis proponataj diversaj tabloludoj kun la intenco pliprofundigi la konon de Esperanto. Survoje laŭ la marbordo al la urbeto *Biot*, kie ni vizitis vitrofabrikon, ni admiris belan pejzaĝon.



Agrable estis admiri la sunleviĝon ĉe la proksima haveneto de *Les Issambres*, kie la mevoj salutas kaj adiaŭas la spektantojn. Dum la libera posttagmezo ni



Vizito al vitrofabrikejo. Ege belaj veziko-vitraĵoj estas produktitaj.

Gunnar





povis ludi kartojn aŭ promeni en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe la marbordo en salono *Batterie* estis interesa ekspozicio pri la aviadilisto, esploristo kaj verkisto *Antoine de Saint-Exupéry*, kiu loĝis en la regiono. En la loka ĵurnalo *Var-Matin* aperis artikolo pri nia aranĝo kun komuna foto.



Christine kaj Martine

Vespere ni ĝuis gitar-koncerton de Mikaelo Bronštejn, Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la



pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976), kaj kun Nina Cvileneva ŝi prezentis al ni la urbon *Ufa* kaj ties folklorajn ensemblojn. Pri la urbo *Volgograd* prezentis filmon Tatiana Vtorova. Raĭta Pyhäla rakontis pri la artisto Yrjö Saarinen kaj montris liajn pentraĵojn. Gunar Olson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de cent tri akordionoj kaj interese parolis pri ili. Ángel Garcia per filmo invitis nin al la ĉi-jara hispana kongreso, kiu okazos en majo en la pitoreska urbeto *Comillas* proksime al *Santander*. Edmond

Plutniak parolis pri "Eta Pollando en Norda Francio". Temis pri poloj invititaj enmigri Francion komence de la 20-a jarcento por labori en karbo-minejoj. Ni eksciis pri iliaj malfacilaĵoj, kutimoj, folkloro, kristnaskaj, paskaj kaj geedziĝaj festoj, pri dancoj, sporto, kuirarto. Li entuziasme rakontis pri ĉiuj interesaĵoj. Ĉe la fino gaja muziko dancigis la ĉeestantojn.


Dum la adiaŭa vespero ĉiu kurs-gvidanto pretigis programerojn por distriĝo. Sonis kantoj kaj ni spektis amuzajn teatraĵetojn, skeĉojn, kvizon.



Skeĉo: kapitano kaj kontrol-turo



Gunnar prelegas pri arkodionoj



Edmond Plutniak pri poloj en norda Francio



Fotoj Andreo

La koruso de Mikaelo

Ĉe la fino mi invitis la partoprenantojn al la fervojista kongreso okazonta en Frankfurto ĉe Odro. Poste ni gratulis kaj pridonacis la kursgvidantojn kaj la organizantojn de la evento. Ne mankis kutima loterio kaj dancado kun akompano de akordiona muziko fare de filinoj Prezioso.

Necesas danki al la organizantoj de la evento, al Christine Graissaquel kaj al la familio Prezioso, kiu ĉiam estas preta helpi. Do, kun pacienco ni atendas novan inviton venontjare al tiu agrabla loko, kie floras mimozoj kaj kie oni bonege manĝas.

Saliko (Raïta Pyhälä) prezentis pentraĵojn de la finna pentristo Yrjö Saarinen kaj rakontis pri lia vivo.

MES > Niaj prelegantoj




Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976)




Gunnar Olson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de centoj da akordionoj kaj interese klarigis pri la deveno, la fabrikistoj. La italaj akordionoj estis la plej bonkvalitaj.



Ángel Garcia montris filmon kaj tre belajn bildojn pri sia urbo Santander kaj la bela regiono. Kantabrio.





Fotopaĝo pri sezonoj

Vintraj pejzaĝoj en Slovakio sur la monto Biely kameň - Blanka ŝtono



Printempaj pejzaĝoj en suda Francio Les Issambres

